



Protokolo de la Estrar-kunsido de ELI, 8-a de Majo 2017

Ĉeestantoj: Amri Wandel, Jehoŝua Tilleman, Matilda Landaŭ, Ŝlomo Ŝaĥar, Eldad Salzman, Dror Gaon, Asaf Ĥefec, Gabi Zeevi.

Protokolo de la antaŭa kunsido (3-a de Aprilo 2017) – aperis jam antaŭ unu monato publike en la estrara paĝo, kie troviĝas ankaŭ la aliaj protokoloj - <http://esperanto.org.il/estraro.html>

Raportoj

- a) En aprilo aperis 4 artikoloj kaj intervjuoj en la amaskomunikiloj okaze de la Z-jubileo
- b) Raportoj pri la Israela Kongreso aperis en la revuoj Esperanto kaj Ondo de E-o
- c) Recenzo de Ulrich Lins pri la Memolibro de Josi aperos en la julia n-ro de Esperanto

1. Landa Kunveno (Jehoŝua, Matilda)

- a) Eblaj datoj: 19/6, 26/6, 3/7, 10/7 – *decido: la 26-an de junio!*
- b) Ĉu salono aŭ klubejo? – *decido: en la klubejo!* (ni disponos pri la ĉambro ekde 17:30)
- c) Arta programo: Pianisto Tal Babitzky. E-prelego: letero de Mikaelo pri la IK? Amri projekcios bildojn, Jehoŝua pretas laŭtlegi, sed preferinde Amir aŭ Ŝauli (*Matilda petos ilin*)

2. Estontaj Israelaj Kongresoj (Amri)

- a) 2018: Junulargastejoj en la nordo: <http://www.iyha.org.il/hostels/north-hostels/>
Plej allogaj: Akko, Pekiin, Kineret (2 lokoj). *Decido: Akko 26-28/4/2018.*
- b) 20-a IK 2019: Eilat (kun la 12-a Mezorianta Kunveno en Akaba). Eblaj datoj: 11-13/4/2019 – Eilat, 13-15/4/2019 – Akaba. Aŭ: 28-30/3 – Eilat, 30/3-1/4/2019 – Akaba -- Kunlabore kun UEA (Renato Corsetti) - Amri produktos flugfolion kaj reklamos en la UK! [farita]. IK+MK povos okazi en Eilat ĵaŭde-sabate 11-13/4 kaj en Akaba 13-15/4. Aŭ unu-du semajnojn pli frue. *Decido: 30/3-1/4/2019*

3. Reta reklam-kampanjo

Amri lanĉis reklamkampanjon en Facebook pri la agado de ELI (en amaskomunikiloj kaj en la Jerusalema Libro-Foiro) aperantaj en la hejmpaĝo de la ELI-retejo. 110 NIS por 7 tagoj. Dum la unuaj tri tagoj la kampanjo atingis pli ol 6000 personojn kaj ricevis pli ol 300 ŝatojn (dank' al la alloga bela bildo de unu israela E-istino) [Fine de la kampanjo: 10,000 personoj kaj 600 ŝatoj]



4. Jerusalema Libro-Foiro 11-15/6 (Amri)

- a) Deĵorado en nia budo – Amri jam komencu varbi rete!
- b) Anstataŭ prelego: La 14/6-an posttagmeze publika panelo pri E-o, lingvo kaj traduko, kun Doron, Tali kaj Amri.
- c) La foiro estas okazo por renkontiĝo kun Monir, la palestina fraŭlo kiu interesiĝas pri E-o
- d) Eblecoj por klubo en Jerusalemo...

5. Financoj (Ŝlomo)

- a) Finkalkulo de la IK: Deficito de proksimume 4 (AK) +5 (IK) +3(PK) mil = sume 12 mil NIS (IK pro la decido subteni la tutan programkoston, AK kaj IK pro ne sufiĉaj *pagantaj* partoprenantoj -- AK: 4 el 7, PK:1 el 4)
- b) 1/4 jara buĝeto 2017 - klarigo de la sendita raporto
- c) Oficejo - Ŝlomo traktas proponon kun kondiĉoj por hipoteko de unu banko
- ĉ) Malpago por ne okazintaj renkontiĝoj en WIZO, ĉu okazis? Jehoŝua: *ordigitaj!*
- d) Kvitancoj por membrokotiĝoj (kiu helpos al Jehoŝua en la LK?) – volontuloj (Lea, Gabi – se sukcesos veni frue, Amri)

6. Dissendado de Israela E-isto

- a) Jehoŝua sendis la liston al Dror, kiu printis etiketojn.
- b) Dum la kunsido la estraranoj helpis enkovertigi.
- c) Amri surgluos la adres-etikedojn, verkos akompanan leteron por la eksterlandaj abonantoj, telefonos al la ne pagintaj membroj kaj enpoŝtigos kun kvanto-rabato en Jerusalemo [*farita*]

7. Grupa mendo de la nova libro pri E-o

Por komuna mendo de la nova libro "Bridge of Words" Amri trovis malmultekostan oferton kaj sendis alvokon en la ELI-listo. La reta prezo - \$13-16 (+ sendokostoj, dividotaj inter la mendintoj). Venis nur tri petoj: Jehoŝua, Ŝaul Ĥasid kaj Ora Maŝiaĥ (or5708@gmail). Jagil proponis fari grupan mendon. Amri atentigos lin [*farita*]

La venonta kunsido: lunde, la 5-an de Junio 2017, je 19:45

Protokolis: Gabi Zeevi